

2652084

ALDONO AL „POLA ESPERANTISTO”.

Jan Aleksander Fredro.



CONSILIUM FACULTATIS

KOMEDIO EN UNU AKTO, PROZE.

El lingvo pola tradukis


Antoni Grabowski.

VARSOVIO.
ELDONO DE JAN GÜNTHER
1909

PERSONOJ:

SINJORO GASPARO BOLBECKI.
MARGARETO, lia edzino.
ANJO, ilia filino.
ZDISLAVO MOJICKI.
VLADISLAVO ŜOCKI.
DOKTORO REŜKO.
VALĈJO, servanto
JOANJO, servantino } ĉe gesinjoroj Bolbecki.

Agado en vilaĝo, ĉe sinjoro Bolbecki.



1356142

Druk L. Bogusławskiego, ul. [S-to Krzyzka 11, tel. 195-52.

(La teatro prezentas salonon de vilaĝa biendomo, profunde de l' scenejo estas du pordoj, inter ili staras tablo. Dekstre en la unua kuliso estas vitra pordo, kondukanta al ĝardeno — en la dua kuliso: pordo al ĉambro de sinjoro Gasparo; en la tria: ŝranko kun teleroj, botelo da vino, glasoj, tranĉiloj, forketoj, kuleroj k. t. p. En la antaŭparto de la scenejo staras malgranda skribtablo kun inkujo, papero, plumoj k. t. p., antaŭ ĝi seĝo. Maldekstre, en la unua kuliso estas kameneto, en kiu brulas fajro; antaŭ la kameneto staras malgranda kanapo kaj ronda tableto. Sur ĝi karafo kun akvo, kelke da glasoj kaj kalendaro. En la dua kuliso estas la pordo, kondukanta al la ĉambro de sinjorino Margareto, en la tria kuliso: pordo al ĉambro de Anjo. Kelke da seĝoj. Kiam leviĝas la kurteno Valĉjo dormas kun skandelo (varmigilo) en mano, sidante sur la kanapo).

SCENO UNUA.

VALĈJO, JOANJO.

JOANJO (*enkurante el la ĉambro de sinjoro Gasparo*).

Valĉjo!... Valĉjo!... Kie do estas la skandelo? (*rimarkante, ke Valĉjo dormas*) Valĉjo!...

VALĈJO (*vekite, leviĝas rapide kaj kuras al la vitra pordo*).

He!... Kion vi volas?... Kataplasmon!... tuj!...

JOANJO.

Ne... ne kataplasmon — sed la skandelon, la varmigilon!... donu tuj la skandelon!

VALĈJO (*dormema*).

Skandelon? ... Kian skandelon? ... Mi vidis nenian.

JOANJO.

La skandelon, kiun vi tenas en la mano. Vekiĝu fine, dormemulo!

VALĈJO (*kvazaŭ en sonĝo*).

Ha — jes! — la skandelon...

JOANJO.

Portu ĝin rapide! La sinjoro atendas ĝin jam de unu kvaronhoro.

VALĈJO (*malfermante malrapide la skandelon*).

Sed ĝi estingiĝis!

JOANJO.

Enmetu brulaĵon! — nur rapide — rapide — ĉar la sinjoro malbenas tiel forte, ke tremas la vitroj!

VALĈJO (*enmetante per prenilo brulaĵon en la skandelon*).

Li malbenas? — ĝi estas nenio nova! Ah, fraŭlino Joanjo! fraŭlino Joanjo! Vi ne scias, kio signifas esti ŝuferanta!

JOANJO.

Vi — suferanta? ... mankas nur tio!

VALĈJO.

Ah! Kaj kiel mi estas ŝuferanta! Vi ne kredas, kaj tamen ... jen nun ... en tiu-ĉi momento ... (*li oscedas*), mi estas tiel dormema, ke min apenaŭ tenas la piedoj.

JOANJO (*ridante*).

Vi nomas tion esti suferanta?

VALĈJO.

Kiel do? — mi estas ĉiam — senĉese, ĉiam — aŭ dormema, aŭ malsata, kiel nia sinjoro. Kaj ĉu oni povas iam sufiĉe dormi en tiu-ĉi domo?

JOANJO.

Sed vi dormas ja la tutan tagon.

VALĈJO.

Jen — tage mi duonfermas iam la okulojn, sed dum la nokto! ... Apenaŭ vespere mi kuŝiĝas, — tuj la sinjoro jam vokas ...

S-ro GASPARO (*post la scenejo*).

Valĉjo! la skandelon, pro cent mil diabloj! ... donu la skandelon!

VALĈJO.

Tuj! tuj! (*al Joanjo*). Jen tio ripetiĝas preskaŭ ĉiunokte ... apenaŭ mi ekdormetis, la sinjoro jam krias: „Valĉjo la skandelon! Valĉjo — la kamomilon! —

Valĉjo — varmigu la griajon! Valĉjo — frotu la spinon! Valĉjo, faru tion — Valĉjo, faru alion!” Kaj krom tio, se la sinjoro de tempo al tempo ekkaptas min je la kapo, tiam eĉ kraketas la haroj ... kiel ekzemple dum la pasinta nokto.

JOANJO.

Vi dezirus, ke li ne kaptu vin je la kapo, kiam vi metis bolantan griajon sur lian ventron.

VALĈJO.

Kiel mi povas scii, kion li bezonas? Li ordonis, ke la kaĉplasma estu varma, do mi metis al li varman... sed kiel tiu-ĉi kaĉo bonodoris!

JOANJO.

Fi! — kataplasmon... Ĉu vi ne hontas? ... Jen ... ne pensu ĉiam pri manĝado kaj nun plirapidu!

VALĈJO.

Jes — rapidu! — ĉiam rapidu! ... facile ĝi estas direbla ... dume apenaŭ min portas la piedoj, kaj mi mem pro malsano baldaŭ devos kuŝiĝi en la liton.

S-ro GASPARO (*post la scenejo*).

Valĉjo! — malbenita fripono! — donu la skandelon, aŭ mi forŝiros de vi la kapaĉon!

VALĈJO.

Ĉu vi aŭdas, fraŭlino Joanjo? „Mi forŝiros de vi la kapaĉon” — dume mi estas tiel ŝuferanta! (*krias, turnite al la pordo*) Tuj, sinjoro! — tuj, senprokraste, kiam la skandelo nur varmiĝos. (*al si*) Kaj mi estas tiel ŝuferanta.

JOANJO.

Por diri la tutan veraĵon, ŝajnas al mi, ke vi estas tiel same malsana, kiel via sinjoro. Ambaŭ vi faras nenion — tute nenion, nur vi manĝas kaj dormas; nature estas, ke poste ...

S-ro GASPARO (*post la scenejo*).

Valĉjo! — fripono! — kanajlo! mi rompos al vi la ostojn!

VALĈJO.

Nun li rompos la ostojn!...

SCENO DUA.

ANJO, JOANJO, VALĈJO.

ANJO (*enirante el la ĉambro de s. Gasparo*).

Valĉjo — pli rapide! Vi aŭdas ja, ke la patreto fariĝas malpacienca; tio povas malutili al li.

VALĈJO (*al si*).

Aŭ pli ĝuste — tio malutilos al mi. (*Al la pordo, elirante*). Mi jam portas — mi jam portas! (*eliras en la ĉambro de s. Gasparo*).

ANJO.

Ĉu la patrino dormas ankoraŭ?

JOANJO.

La sinjorino ĝis nun ankoraŭ ne sonoretis.

ANJO.

La bedaŭrinda panjo! preskaŭ la tutan nokton ŝi maldormis, flegante la patron—apenaŭ antaŭ la mateno prosperis al mi inklinigi ŝin, ke ŝi iru ripozi.

JOANJO.

Oni devas ja konfesi, ke ni havis ree nokton tre malkvietan.

ANJO.

La paĉjo tiel suferis!

JOANJO.

Certe; — sed pardonu, fraŭlineto, ĉar al mi ŝajnas, ke ĝi ne povas esti alie...

ANJO.

Kial do?

JOANJO.

Kalkulu nur, fraŭlineto, kion la sinjoro formanĝis hieraŭ dum la vespermanĝo. Marinitan angilon, porkaĵon kun acida brasiko, farĉitajn bulojn kun pruna kaĉo — kaj duonon da melono.

ANJO.

Jes — certe — eble iom tro multe... sed la mortinta doktoro Hugo ne ordonis ja tiel precizan dieton-

JOANJO.

Ĉar li mem manĝadis bonege apud nia sinjoro, kaj oni devis leviĝi tre frue, por vidi la doktoron tute sobra. Li trinkigis nian sinjoron ĉiam per miksturoj kaj nutris per piloloj — Dio kompatema! (*al si*) Eĉ bovon li povus mortigi!

S-ro GASPARO (*post la scenejo*).

Aj! vi brogas min! — vi brogas — mallertulo!...

VALĈJO (*post la scenejo*).

Aj!... aj!... aj!... lasu min, sinjoro.... lasu min!... (*oni aŭdas bruegon en la ĉambro de s. Gasparo*).

SCENO TRIA.

ANJO, JOANJO, VALĈJO, (*poste*) S-ro GASPARO.

(*Valĉjo enkuras kun la skandelo en la mano, trakuras la scenejon, elkuras tra la pordo maldekstra, profunde de P scenejo. S-ro Gasparo en nokta surtuto, blankaj flanelaj pantalonoj kaj pantofloj, kun kuseneto en la mano, enkuras kaj ĵetas ĝin post Valĉjo, sed tiel, ke li trafu la pordon jam fermitan*).

ANJO.

Kio estas — Kion li faris al vi, paĉjo?

S-ro GASPARO (*levante la kusenon, kiun li metas sub la maldekstran brakon, kaj palpante sian dekstran tibikarnon*).

Tiu mallertulo malsaĝa!... Kion li faris? li brogis min per la skandelo!... stultulo... Ho!... Kaj nun mi iras dormi; — ne veku min — escepte se alvetur os la doktoro. (*li eliras en sian ĉambro*).

JOANJO.

Mi vetos, ke Valĉjo ekdormis, varmigante la litajon por la sinjoro.

ANJO (*rigardante la horloĝon*).

Mi miras, ke la doktoro ankoraŭ ne venas.

JOANJO.

Oni sendis por li veturilon en Pŝemislon, ankoraŭ antaŭ la tria horo matene, verŝajne li ne estas hejme.

ANJO.

Mi konfesos al vi, Joanjo, ke min iom maltrankviligas la nova kuracisto, kiu venistien-ĉi el Tarnopol; ni ne konas lin, — ni ne scias, ĉu li estas kapabla...

JOANJO.

En ĉiu okazo — li estos pli kapabla, ol la maljuna doktoro Hugo.

ANJO.

Povas esti, sed la patro fidis al la malnova.

JOANJO.

Li fidis tro multe. (*al si*) Li ekkredis, ke li estas malsana. (*oni aŭdas post la scenejo la knarbruon de proksimiĝanta veturilo — Joanjo, rigardante tra la vitroj de l' pordo*). Fraŭlineto! fraŭlineto! — La sinjoro doktoro alveturis! — Kaj kiel juna li estas! — kaj kiel bela! — Tio estos certe la edzo por nia fraŭlino.

ANJO (*malkontente*).

Kion vi babilas!

JOANJO.

Mi kuras por enkonduki lin tien-ĉi (*ŝi elkuras dekstre — profunde de l' scenejo*).

SCENO KVARA.

ANJO (*sola*).

Juna — bela. Ho! mi bedaŭrinda, malfeliĉa! — Guste tion mi timis. Dum la vivo de la honesta, maljuna doktoro Hugo, mi tremis ĉiam, pensante pri la estonteco, sed almenaŭ mi havis trankvilon — kaj nun... tiu doktoro juna, bela — se la patro lin ekvidos...

SCENO KVINA.

ANJO, JOANJO, ZDISLAVO.

JOANJO (*enkondukante Zdislavon*).

Tra ĉi-tie, sinjoro doktoro! ĉi-tie!

ZDISLAVO.

Mi dankas — sed mi ne estas...

JOANJO.

Jen nia fraŭlineto! (*riverencas kaj elkuras en la ĉambro de s. Gasparo*).

ZDISLAVO (*ekvidante Anjon*).

Ah! Ah! Fraŭlino Anno! Kiel mi estas feliĉa!

ANJO.

Kio?... Jen vil... Sinjoro Zdislavo... Ho mia Dio! Ah!.. (*Kaptas sin je la koro, duone svenante*).

ZDISLAVO (*alsaltante al ŝi kaj prenante ŝian manon, kiun li kisas*).

Sinjinino! ah sinjinino! — tiu kortuŝo... kiom da feliĉo ĝi anoncas al mi.

ANJO.

Pardonu sinjoro! — sed via alveno tiel ne atendita...

ZDISLAVO.

Kiel do? Vi min memoris kaj povis dubi...

ANJO.

Ho, ne, mi ne dubis — sed kiam la lastan fojon, antaŭ jaro, ni vidis nin ĉe la onklino, vi diris, ke ne pli frue, ol kiam vi havos certigitan situacion en la mondo, vi alvenos...

ZDISLAVO.

Por peti viajn gepatrojn, por petegi ilin surgenu, ke ili donu vin, Sinjinino, ke ili donu cin, kara Anjo, al mi kiel edzinon.

ANJO.

Sekve nun...

ZDISLAVO.

Mi fariĝis unuaklasa inĝeniero ĉe la Pŝemislo-Lupkova fervojo.

ANJO (*malgaje*).

Inĝeniero!

ZDISLAVO.

Jes, tiel estas — mi havas bonegan oficon.

ANJO.

Bedaŭrinde! domaĝe!

ZDISLAVO.

Kiel vi diras? — „domaĝe”! Tiu-ĉi ofico alportas al mi kvarmil spemilojn de jara salajro kaj nun mi povas kuraĝe...

ANJO.

Ah! vi eraras, sinjoro Zdislavo — vi eraras, bedaŭrinde!...

ZDISLAVO.

Kion vi diras? mi ne havas kvar milojn?...

ANJO.

Ne pri tio mi parolas — sed mia patro projektas, ke li donos min kiel edzinon nur al kuracisto.

ZDISLAVO.

Sed tio estas frenezajo!.. Ho!.. pardonu...

ANJO.

Estante tre malsanema, li volas havi kiel bofilon kuraciston.

ZDISLAVO.

Ha! ha!... tio estas ne honesta! — Mi diros al li...

ANJO.

Kompatu, sinjoro, kaj pripensu, ke li estas homo malsanema.

ZDISLAVO.

Ĉu vi volas, sinjorino, ke mi pro tio fordonu la esperon?

ANJO (*malgaje*).

Mi ĝin ne havas.

ZDISLAVO.

Kion? — ĉu mi bone aŭdis? — vi! — vi, fraŭlino Anno, kiu en tiu-ĉi momento montris tian kortuŝitecon — tiom da sento — vi povas trankvile akcepti la ideon pri disiĝo por ĉiam? Sekve tiu kortuŝo estis ŝajnigita. Vi min ne amis, sinjorino! Vi nur mokis pri mi.

ANJO.

Sinjoro Zdislavo! Ĉu mi meritis tian suspekton?

ZDISLAVO.

Vi mem ja forprenas de mi la esperon — vi konsentas esti la edzino de iu alia!... de kuracisto!...

ANJO.

Ho, ne, sinjoro Zdislavo! vi eraras. Mi devas obei mian patron, sekve mi ne edziniĝos kontraŭ lia volo, sed esti la edzino de iu alia... neniam! pli frue mi mortos!

ZDISLAVO (*kaptante ŝian manon, kiun li kisas*).

Anjo! — kara — amata anĝelo! — ne! — ci ne mortos — ĉar mi cin amas pli ol la vivon! — ci estos... ci devas esti mia!

ANJO.

Tion, kion mi al vi promesas, mi plenumos fidele, nenion pli. Kaj nun foriĝu! foriru kiel eble plej rapide!

ZDISLAVO.

Kion? — vi volas, ke mi foriĝu? — nun, kiam la ĉielo por mi malfermiĝas? Ho, ne — la feliĉo donas al mi kuraĝon, mi restos tie-ĉi — mi vin akiros de la patro per petoj, per petegoj, mi vin konkiros.

ANJO.

Sed tio estas neebla! — mia patro estas malsana, krom tio iom... iom... obstina. Li eĉ ne volos paroli kun vi.

ZDISLAVO.

Kion vi diras? — ĉu ne ekzistas rimedo por lin ekvidi?

ANJO.

Mi diras ja al vi, ke li estas malsana, ĉiumomente ni atendas tie-ĉi la doktoron Reŝko.

ZDISLAVO.

Reŝkon!... brave!... vivu!... ni gajnis!... ni gajnis!...

ANJO.

Kion vi diras?... parolu! — kia nova ideo!

ZDISLAVO.

Jes! jes! ideo bonega! grandioza! genial!

ANJO.

Sed ja...

ZDISLAVO.

Aŭskultu do! — Hieraŭ mi estis ĉe gesinjoroj Dorecki en Novosjolki por inspekti la laborojn ĉe la fervojo. Tie mi renkontis mian malnovan amikon, doktoron Reŝko. Li diris al mi, ke li volas esti tie-ĉi en la estonta semajno, por prezenti sin al viaj gepatroj, ĉar nun li devas resti ankoraŭ dum kelke da tagoj ĉe sinjoro Dorecki, kies onklo estas danĝere malsana; do dum tiuj malmultaj tagoj mi ludos la rolon de doktoro Reŝko.

ANJO.

Sed tio estas ideo freneza!

ZDISLAVO.

Ideo savanta, diru pli ĝuste. — Dum tiuj malmultaj tagoj via patro ekkonos min, mi ekplaĉos al li, mi lin konkiros — kaj ĉio estos bona!

ANJO.

Vi parolas, kvazaŭ vi estus perdinta la prudenton; mia patro estas ja malsana, kiele do vi volas ŝajnigi kuraciston, ne sciante la medicinon?

ZDISLAVO.

Por tio respondas mi.

ANJO.

Fine vi povas kaŭzi al li ian malutilon.

ZDISLAVO.

Tute ne. Vi komprenas ja, kiel vive min interesas ĉio, kio koncernas vian domon. Sekve ĉe gesinjoroj Dorecki, kiuj estas ja viaj plej proksimaj najbaroj, mi demandis pri la plej malgrandaj detaloj de la karaktero de viaj gepatroj, por scii, kiel oni povas ekplaĉi al ili. Jen oni diris al mi — sed vi ne koleru — ke via patro — estas malsana je imageco — aŭ pli ĝuste — je iom... tro granda apetito...

ANJO.

Vere dirante... ankaŭ al mi ŝajnas tiel.

ZDISLAVO.

Sekve vi vidas, ke, ĉar li ne estas malsana, — do mi lin ne kuracos, kaj ankaŭ malutili al li ne povos.

ANJO.

Sed li volas esti kuracata senĉese.

ZDISLAVO.

Tion mi al li persvados iamaniere.

ANJO.

Sed kion diros pri tio la panjo? Ŝi neniam tion aprobos.

ZDISLAVO.

Ni do nenion diros al ŝi; mi scias ja, ke precipe ŝi maltrankviliĝas pri la sano de l' patro; do ŝi devas opinii, ke mi estas doktoro.

ANJO.

Ne — ne — tio estas neebla! tio estas frenezajo!

ZDISLAVO.

Do vi preferas, ke mi forveturu? ke nia amo, niaj esperoj restu vanaj aŭ almenaŭ estu prokrastitaj ĝis nedifinita tempo?

ANJO.

Tion mi ne diras... sed...

ZDISLAVO.

Ke ni ne revidu nin dum kelke da jaroj?

ANJO.

Ne, sed...

ZDISLAVO (*ridetante*).

Ĉu vi ne rimarkis, ke eĉ la servantino salutis min kiel doktoron, kiam mi tien-ĉi eniris?

ANJO (*ridetante*).

Vere, Joanjo titolis vin doktoro.

ZDISLAVO.

Jen la antaŭdestino parolis per la buŝo de tiu-ĉi senkulpa knabino! (*prenante la manon de Anjo*). Do fidu, kara Anjo, al la antaŭdestino, al mia amo, al mia prudento.

ANJO.

Mi mem ne scias, ĉu mi devas obei al vi.
(*oni aŭdas post la scenejo kraĉotusadon de s. Gasparo*).

ZDISLAVO.

Pst! ŝajnas al mi, ke via patro alvenas.

ANJO.

Mi apenaŭ vivas pro timo!

SCENO SESA.

LA SAMAJ, S-ro GASPARO.

(*S-ro Gasparo tre korpulenta kaj ruĝa; la haroj krispaj, duongrizaj; longaj vangharoj; — li estas en nokta surtuto, sed malsupre tute vestita. Li parolas per malforta voĉo, sed ĝemas forte*).

S-ro GASPARO (*enirante dekstre*).

Eng... diris al mi Joanjo... eng... ke sinjoro doktoro Reŝko alveturis... eng... kie do li estas?

ZDISLAVO (*salutante*).

Preta servi al via moŝto... doktoro Reŝko.

S-ro GASPARO.

Eng... agrable estas al mi interkoniĝi kun sinjoro konsilano... eng... Anjo, venu tien-ĉi... eng... ke mi povu apogi min. (*Anjo kaj Zdislavo proksimiĝas al li, subapogante ambaŭflanke liajn brakojn, kaj kondukas lin al la kanapo. S-ro Gasparo ŝovas la piedojn*).

ZDISLAVO.

Mi petas vian moŝton.

S-ro GASPARO.

Eng... apenaŭ tenas min la kruroj... eng... tien... al kanapo... eng... oj... Anjo, alportu al mi kuseneton. (*Anjo eliras en la ĉambron de S-ro Gasparo kaj tuj revenas kun kuseneto. S-ro Gasparo duone etendiĝas sur la kanapo*). Uf! kiel mi laciĝis!

ZDISLAVO (*al si*).

Ĉu li estus efektive malsana?

S-ro GASPARO.

Vi venas ĝustatempe, sinjoro kuracisto... eng... kaj eble jam tro malfrue.

ZDISLAVO.

Kion vi diras sinjoro...

ANJO.

La paĉjo fartas ja nun pli bone.

S-ro GASPARO (*per forta voĉo*).

Pro diablo! mi ne fartas pli bone! (*per voĉo malforta*). Ho, ve, mi estas malsana, tre malsana, sinjoro doktoro... oni min baldaŭ forportos.

ZDISLAVO.

Ba, ba, ba, kiaj pensoj!

ANJO (*al Zdislavo*).

La paĉjo nur tiel diras...

S-ro GASPARO (*per forta voĉo*).

Se mi diras, ke oni min forportos, sekve oni forportos, sen ia kontraŭdiro! — Kial vi faras opozicion?

ZDISLAVO.

Nu, nu, nu, malrapide... senkolere...

S-ro GASPARO (*komencante paroli pli malforte*).

Hm, ĉar tiu-ĉi, tiu-ĉi... si devas ĉiam enmiksi sian vorton... (*al Anjo*). Pro kio vi staras nun ĉi-tie kaj malhelpas la konsulton? Iru plibone dormi en vian ĉambron (*karesante sian mentonon*). Bedaŭrinda infano, de la tria horo matene ŝi sidis apud mi. Iru, Anjo, ripozu. Kiel ŝi estas pala...

ANJO.

Eble la paĉjo permesos resti.

S-ro GASPARO.

Se mi diris, iru dormi, vi iros dormi, senprokraste. Mi konsultos tie la doktoron. Nu, kisu min, mia filineto. (*Anjo kisas lian frunton, riverencas al Zdislavo, kiu riverencas siaflanke. Mimika ludo inter la ambaŭ: li kvazaŭ ŝin certigas, ke li estos prudenta. Anjo eliras tra la dua pordo maldekstre*).

SCENO SEPA.

S-ro GASPARO, ZDISLAVO.

S-ro GASPARO.

Mi diras al vi, sinjoro doktoro, ke mi fartas tre malbone, tre...

ZDISLAVO.

Ni vidos...

S-ro GASPARO.

Mi ne havas apetiton.

ZDISLAVO (*mirigita*).

He?

S-ro GASPARO.

Mi diras, ke mi ne havas apetiton... tio estas laŭvere... iafoje mi ion manĝetas... sed, ke mi trovas ĝin bongusta, tion mi ne povas diri... jen mi gustumas iomete unu manĝaĵon, la duan...

ZDISLAVO (*senpripense*).

La trian...

S-ro GASPARO.

Iafoje eĉ la kvaran, sed sen apetito, mi juras, pro Dio, sen apetito.

ZDISLAVO.

Kiomfoje manĝas ĉiutage via sinjora moŝto?

S-ro GASPARO.

Kiel ofte al mi prosperas, sinjoro doktoro, kiel ofte al mi prosperas. Jen kutime, matene inter la naŭa kaj deka horo, mi trinkas kafon; tiam, vere, mi manĝas kvin, ses bulketojn kaj kelke da pecoj de pano kun butero; sed nur tiam, kiam ni havas hejme tute freŝan panon; — poste, je la dekunua horo, mi trinkas brandon kaj intermanĝetas kotleton. Je la unua horo mia edzino donas al mi brandon kaj iom da kaviaro, sardeloj, konfitaĵo... nur por plifortigi la apetiton antaŭ la tagmanĝo; nu, poste venas la tagmanĝo je la dua horo, kaj mi jam nenion pli manĝas, nur je la kvina mi trinkas kafon kaj manĝas iom da fruktoj kun acida kremo. Mi restas tiel kun malplena stomako kaj nenion manĝante ĝis la oka horo, ĉar ni vespermanĝas je la oka, por iri pli frue dormi... vi komprenas, ĉar mi estas malsana...

ZDISLAVO.

Mi komprenas, mi komprenas bonege...

S-ro GASPARO.

Ĉu ne vere, estas ja sane iri dormi frue?

ZDISLAVO.

Kompreneble!... Kaj kiel via sinjora moŝto kvietigas la soifon?

S-ro GASPARO.

Eng...

ZDISLAVO.

Eng?

S-ro GASPARO.

Kiam mi trinkas bieron, mi havas apetiton trinki vinon hungaran; kiam mi trinkas vinon hungaran, mi volus vinon ruĝan, francan; — kiam mi trinkas francan vinon, mi kvazaŭ deziras ĉampanon, ĉar ĝi estas ŝaŭmetanta, sinjoro, ŝaŭmetanta... sed ke mi sentus veran bonguston, ne... Jen mi trinkas nur iajoje kun bongusto kaliketon da malnova brando, je la dekunua horo, sed la duan kaliketon antaŭ la tagmanĝo mi ne trovas jam tiel bogusta.

ZDISLAVO.

La dua jam ne estas tiel bongusta? Strange!

S-ro GASPARO.

Tiel same okazas kun la dormo; se mi dormas iom post la matenmanĝo, mi povas esti certa, ke post la tagmanĝo la dormeto jam ne prosperos al mi. Kaj se iam, okaze, ambaŭ dormetoj prosperas, kio okazas tre malofte, eble escepte dum varmega tago, aŭ antaŭ la pluvo, tiam mi povas jam adiaŭdiri al la nokto!

ZDISLAVO.

Ĉu tio estus ebla?

S-ro GASPARO.

Ho, ho! tiam dum pli ol ok, naŭ horoj mi neniel povas dormi!

ZDISLAVO.

Tio estas efektive ne kredebla.

S-ro GASPARO (*ĝemetante*).

Kaj tamen, ĝi estas tiel, bedaŭrinde! Tiel estas, tiel estas, sinjoro doktoro, mi jam foriĝas en alian mondon, tute sendube, mi jam foriĝas! (*leviĝante*). Ho! sed estas terura trablovo inter tiu-ĉi pordo kaj la kameno; oni povus ricevi la paralizon. Mi proponas, sinjoro konsilano, ke ni iru pli bone en mian ĉambron; tie mi iom ripozos kaj rakontos al vi ankoraŭ kelkajn detalojn, kiujn ĉi-tie... (*montrante la publikon*) vi komprenas...

ZDISLAVO.

Jes, jes, mi komprenas.

S-ro GASPARO (*al si*).

Bonega kuracisto! Jen, bone estus, se prosperus al mi kapti lin por mi kiel bofilon! (*laŭte*). Donu al mi vian brakon, doktoro... vi scias, ke mi apenaŭ iracas!

ZDISLAVO.

Mi servas al via Moŝto.
(*li donas al li la brakon, ili eliras ambaŭ dekstre*).

SCENO OKA.

S-ino MARGARETO (*eniras tra la unua pordo maldekstre*).

Ŝajnas al mi, ke mi dormis tro longe, kaj eble estas jam la tempo doni la kuracilon al mia bedaŭrinda edzo. Laŭvere, Anjo estas apud li (*rigardante la horloĝon sur la kameno*). Duono de la dekunua. Tio ne estas ebla, verŝajne la horloĝo difektiĝis. (*metante la orelon al la horloĝo*). Ĝi iras, stranga afero! Sed en la domo estas iakaŭze tiel mallaŭte; eble ĉiuj ekdormis, mi devas enrigardi tute silente... (*Ŝi iras la sur piedpintoj al la pordo de Gasparo. Post la scenejo, el la flanko de la vitra pordo, oni aŭdas knarbruon de veturilo. S-ino Margareto haltas*). Iu alveturas; la abomena knarbruo, ĝi povas vekti Gasparĉjon. (*Ŝi iras al la vitra pordo*). Certe la doktoro... sed ia juna, tia suĉulo jam doktoro! Ĥa! hodiaŭ la tuta mondo estas kvazaŭ renversita! Ĉu oni povas fidi al iu! Nu, nu, mi ne permesos al li fari grandajn saltojn; mi konsultos lin pri Gasparĉjo, sed aplikos daŭrige la receptojn de la honesta Hugo.

SCENO NAŬA.

S-ino MARGARETO, VLADISLAVO.

VLADISLAVO (*enirante profunde de l' scenejo kaj riverencante*).

Sinjinoro...

S-ino MARGARETO (*al si*).

Ankoraŭ tute infano. (*laŭte*). Sinjoro do... doktoro...

VLADISLAVO.

Mi petas pardonon, sinjorino, t. e. pardonu, onklinino... ĉar mi jam rekonas la onklineton; mi ne estas doktoro, sed via nevo, mi estas Vladislavo Ŝocki.

S-ino MARGARETO.

Kiel, sinjoro... vi... ci?

VLADISLAVO.

Mi estas Vlaĉjo!

S-ino MARGARETO (*etendante al li la brakojn*).

Ci... ci estas Valĉjo?

VLADISLAVO.

Jes, tiel estas, kara onklinjo.

S-ino MARGARETO.

Ho mia infano, venu, ke mi vin alpremu al mia koro kaj kisu! Neniam, neniam mi vin estus rekoninta. Tiom da jaroj mi vin ne vidis. Vi estis tia, tia malgranda knabeto.

VLADISLAVO.

Mi elkreskis, onklinjo, ĉu ne vere?

S-ino MARGARETO.

Kaj tamen mi vin devus rekonu, tiel multe vi rememorigas al mi mian bedaŭrindan fraton.

VLADISLAVO.

Sed la patro tute ne estas bedaŭrinda, li estas sana, liaj aferoj sukcesas bone, kaj li min sendas tien-ĉi...

S-ino MARGARETO.

Ah, mia Dio, mi forgesis!

VLADISLAVO.

Tute ne maltrankviliĝu, kara onklineto: la patro volas jam fini la malnovan malpacon kun la onklo kaj pro tio li sendis min ĉi-tien, por ke mi prezentu

min al la onklo kaj lin petu, ke ĉiuj malpacoj estu por ĉiam forgesitaj.

S-ino MARGARETO.

Ah, kiel mi ĝojas pro tio!.. Sed nun, kiamaniere ni tion aranĝos? Mia edzo estas malsana, eĉ la sola rememorigo de l' nomo de mia frato lin forte kolerigas; des pli mi tion timas nun, kiam, pro malsaneco, li estas forte incitita. Li eĉ ne permesos paroli pri tio, li eĉ ne volos vin ekvidi; tio lin iritos kaj li facile povas danĝere malsaniĝi pro tio.

VLADISLAVO.

Preparu lin, onklinjo, iom post iom.

S-ino MARGARETO.

Jes, vi estas prava, iom post iom, tre malrapide kaj singardeme. Donu al mi nur iom da tempo por ripenso, ke mi povu kolekti la pensojn, ĉar en tiu-ĉi momento, pro maltrankvileco kaj la ĝojo, ke mi vin vidas, mi estas tiel kortuŝita, ke mi tute tremas.

VLADISLAVO.

Amata onklinjo!

S-ino MARGARETO.

Bona, honesta infano! Ni faros tion, ni faros tion, malrapide... Kaj nun, dum li ankoraŭ dormas, parolu al mi pri vi, pri la patro... Mi vin ne vidis de tiom da jaroj; mi tiel deziregas aŭdi pri vi ĉiuj.

VLADISLAVO.

La patro estas sana, ĉiam en bona humoro, la mastrumado sukcesas bone ĉe li, kaj mi estas lia helpanto. Ĉar vi devas scii, onklinjo, ke antaŭ unu jaro mi finis la studojn en la agronomia lernejo en Altenburgo, kaj de post tiu tempo ni mastrumas kune. Jen mi inklinigis la patron, kio, kiel mi konfesas al vi sekrete, estis afero tute ne facila, ke li repaciĝu kun la onklo.

S-ino MARGARETO.

Kiel vi estas honesta!

SCENO DEKA.

LA SAMAJ, VALĈJO:

(*Valĉjo eniras malantaŭe de l' scenejo kun taso da kamomilo, sur kiun li spirblovas.*)

VALĈJO.

La kamomilo faros al mi bone. (*ekvidante Vladislavon*). Ha, sinjoro doktoro! (*stariginte la tason sur tablo malantaŭe de l' scenejo, li alkuras ĝoje al Vladislavo kaj kisas lian manon*). Mi kisas viajn manojn, sinjoro doktoro, mi tuj sciigos la sinjoron mastron pri via alveno, tuj, tuj... (*li elkuras en la ĉambron de s-ro Gasparo*).

SCENO DEKUNUA.

S-ino MARGARETO, VLADISLAVO.

VLADISLAVO (*konsternita*).

Kion li faras?

S-ino MARGARETO.

Kion li faras?

VLADISLAVO (*kurante post Valĉjo*).

Haltu, atendu!

S-ino MARGARETO.

Valĉjo! Valĉjo!

VLADISLAVO.

Jam tro malfrue, li foriris por min anonci.

S-ino MARGARETO.

Ho mia Dio!

VLADISLAVO.

Malbenita afero! La onklo tuj min venigos kaj ĉio klariĝos. Li kredeble koleriĝos, insultos min kaj forsendos, eĉ ne aŭskultinte. Kion fari? Kion mi faros?

S-ino MARGARETO.

Mi mem perdas la prudenton!

VLADISLAVO.

Sed kiamaniere tiu-ĉi azeno povis opinii, ke mi estas doktoro?

S-ino MARGARETO.

Ĉar ni atendas doktoron, kiun ni ne konas.

VLADISLAVO.

Kion vi diras, onklinjo, la onklo ne konas la doktoron, kiun li atendas?

S-ino MARGARETO.

Neniu el ni konas lin.

VLADISLAVO.

Bonege! Ĉu vi scias, onklinjo? Mi prezentos min al la onklo kiel la nova kuracisto.

S-ino MARGARETO.

Ĉu vi furioziĝis?

VLADISLAVO.

Tute ne, estu trankvila, onklineto, mi faros nenian stultajon, kaj ĉiuokaze ni gajnos iom da tempo por prepari la onklon.

S-ino MARGARETO.

Sed vi nenion komprenas el la medicino!

VLADISLAVO.

Des pli bone mi povos ludi la rolon de homeopato; cetere mi diros, ke mi ne kunprenis la apoteketon.

S-ino MARGARETO.

Sed li havas apoteketon.

VLADISLAVO.

Tio-ĉi ne malhelpas, vi scias ja, onklinjo, ke la homeopatio, se ĝi ne helpas, ĝi certe malutilos, mi volis diri: se ĝi ne malutilos, ĝi certe ne helpas.

S-ino MARGARETO.

Tute vere; la mortinta doktoro Hugo, ĉiam tion diradis, sed, tamen...

VLADISLAVO (*vidante la enirantan s. Gasparon*).
Jam tro malfrue.

SCENO DEKDUA.

LA SAMAJ, S-ro GASPARO, VALĈJO.

S-ro GASPARO (*enirante dekstre*).

Sensencaĵo! tio estas ne ebla, ĉar sinjoro Reŝko estas ja ĉe mi.

VLADISLAVO (*mallaŭte al s. Margareto*).

Reŝko el Tarnov! Li estas mia amiko! Estu tran-
kvila, onklinjo!

S-ro GASPARO (*al Vladislavo*).

Pardonu, via sinjora moŝto, tie okazis ia malkom-
prenado de tiu-ĉi ĝapulo; kun kiu mi havas la honor-
on paroli?...

S-ino MARGARETO (*al si*).

Apenaŭ tenas min la kruroj.

VLADISLAVO (*iom konfuzite*).

Mi, sinjora moŝto... mi estas ankaŭ kuracisto...
ankaŭ Reŝko.

SCENO DEKTRIA.

LA SAMAJ, ANJO.

ANJO (*enirante tra la dua pordo maldekstre, al si*)

Ho, pro Dio!

S-ro GASPARO (*mirigite*).

Kion mi aŭdas, du doktoroj Reŝkoj?

ANJO (*al si*).

Ni estas perditaj.

VLADISLAVO.

Tio signifas, jes... ne... ĝuste dirante, mi estas la
kuzo de sinjoro Reŝko el Tarnov... mi estas Reŝko
el Jaroslav.

S-ro GASPARO.

Ho, jes, tio estas io alia (*ĉirkaŭrigardante*). Sed
kie estas la alia?

VALĈJO (*rigardante tra la malfermita pordo en
la ĉambro de s. Gasparo*).

Jen, ho, ho! Li malfermas la fenestron!

S-ro GASPARO (*al la pordo*).

Sinjoro Reŝko! Sinjoro Reŝko el Tarnov!

VLADISLAVO (*al si*).

Mi nun volonte iom promenus!

SCENO DEKKVARA.

LA SAMAJ, ZDISLAVO.

ZDISLAVO (*eniras forte konfuzita, al si*).

Mi preferus nun sidi sur lokomotivo!

S-ro GASPARO.

Ha, ha ni havas tie-ĉi vian kuzon, duan doktoron
Reŝko!

ZDISLAVO kaj VLADISLAVO (*rigardante sin,
kune al si*).

Tio ne estas Reŝko!

S-ino MARGARETO (*al si*).

Mallumiĝas en miaj okuloj!

S-ro GASPARO.

Kio estas, sinjoroj, vi vin ne salutas?

ZDISLAVO.

Pardonu... mi... mi ne estas Reŝko el Tarnov... sed
lia samnomo... mi estas Reŝko el Pŝemisli.

S-ro GASPARO.

Sekve la sinjoroj Reŝkoj ne konas sin reciproke?

VLADISLAVO.

Mi ne havas la honoron. (*Anjo proksimiĝas al
Zdislavo kaj interparolas kun li mallaŭte*).

S-ro GASPARO.

Ha, ha, ha! jen stranga afero! Sed al mi sufiĉas,
ke kunveturis du Reŝkoj, ke mi estas nur inter Reŝk-

oj, nur en la manoj de Reŝkoj! Tio min multe ĝojigas, ĉar ju pli da doktoroj venas, des pli bone fartas la malsanulo. Mi konfesas, ke jam la sola konscio, ke mi havas apud mi du doktorojn, kaŭzas, ke mi fartas multe pli bone, (*glatumante sian ventron*) eĉ vekigiĝas la apetito. Aŭskultu Valĉjo, iru kaj ordonu, ke la kuiristo Blazio revarmigu por mi la bigoson, (brasikajon kun hakita viando)... eble la sinjoroj doktoroj ankaŭ permesos... aŭskultu! cetere li metu ankaŭ kaponon sur la rostponardon... Aŭskultu! kaj antaŭ ĉio donu al ni malnovan litvan brandon. (*li sekvas Valĉjon malantaŭen de l' scenejo, parolante kun li mallaŭte*).

VLADISLAVO (*mallaŭte al s. Margareto*).

Ĉio iras bone, estu do trankvila, onklinjo.

S-ino MARGARETO (*mallaŭte al Vladislavo*).

Mi fariĝis rigida kaj muta.

S-ro GASPARO (*al Valĉjo*).

Jes, kun freŝa butero kaj citrono, vi komprenas?

VALĈJO (*kvazaŭ flarante la bonodoron*).

Mi komprenas. (*eliras malantaŭe de l' scenejo, maldekstre*).

ZDISLAVO (*mallaŭte al Anjo*).

Nur ne perdu la kuraĝon.

ANJO.

Sed pro Dio, estu singardema!

S-ro GASPARO (*revenante, fronte de l' scenejo*).

La matenmanĝeto estos (*sendante kison per la mano*) bonega! Sed dume eble la sinjoroj bonvolus fari malgrandan „consilium”, por ne perdi la tempon, ĉar, kiel diras la Anglo, tempo estas sano, ne, mono estas sano... ne, ne... mono estas tempo... kiel do, pro l' diablo?

ZDISLAVO.

Tempo estas mono.

S-ro GASPARO.

Jes, jes, mi konfuzis, tempo estas sano, jes, jes do ni ne perdu la monon.

ZDISLAVO.

Mi konfesos al vi...

VLADISLAVO.

Mi devas vin antaŭsciigi, ke mi estas homeopato.

S-ro GASPARO.

Kio, homeopato! Alopato kaj homeopato kune! Tio ankoraŭ ne okazis al mi! Bonege! La opinioj interbatalu, tion profitos la paciento. Sekve mi petas vin, sinjoroj, mi petas... sed antaŭe, Margarenjo, Anjo, montru al la sinjoroj kuracistoj la receptojn de doktoro Hugo. (*S-ino Margareto iras meĥanike al la skribtablo dekstren, Anjo al la tablo maldekstren. Ambaŭ elprenas el la tirkestoj po kelke da grandegaj pakoj de kunligitaj receptoj. S-ino Margareto transdonas ilin al Zdislavo, Anjo al Vladislavo*).

ANJO (*al Vladislavo*).

Mi petas, sinjoro.

VLADISLAVO (*prenante la receptojn*).

Mi dankas, sinjorino.

S-ino MARGARETO (*al Zdislavo, donante al li la receptojn*).

Jen la receptoj de doktoro Hugo el la lasta jaro.

ZDISLAVO (*prenante la receptojn*).

El la lasta jaro. (*al si*) Kaj mi devas tion legi?

VLADISLAVO (*al s. Gasparo*).

Mi devas konfesi al vi, sinjoro, ke en tiu-ĉi momento mi ne povos multe helpi al vi, ĉar malfeliĉo okazis al mi en la vojo: mi perdis mian apotekon.

S-ro GASPARO.

Mi havas, sinjoro, mi havas! Anjo, alportu al sinjoro doktoro mian apotekon. (*Anjo eliras en la ĉambiron de s. Gasparo*).

ZDISLAVO (*rigardante la grandegan pakon da receptoj, kiun li tenas en manoj*).

Kaj vi tion-ĉi foruzis?

S-ro GASPARO.

Ĝis la lasta guteto.

ZDISLAVO (*al si*).

Li englutis tion.

VLADISLAVO.

Mi gratulas!

S-ro GASPARO.

Ho, mi scias, ke vi, kiel homeopato ne ŝatas tion; sed estu trankvila, ankaŭ kelke da homeopatiaj apoteketoj trairis tie-ĉi. (*frapetas sian ventron*).

ZDISLAVO (*al si*).

Fera sano! (*Anjo revenas kaj transdonas la homeopatian apoteketon al Vladislavo*).

ANJO.

Jen estas la apoteko!

VLADISLAVO (*kiu per ambaŭ manoj tenas la receptojn, montrante per okuloj la tableton maldekstre*).

Bonvolu sinjorino ĝin meti tien.

S-ro GASPARO (*sidante meze de l' scenejo*).

Kaj nun ni ne perdu la tempon; jen mi estas, sidas, vi konsilu, kaj vi, virinoj, povas foriri.

S-ino MARGARETO (*mallaŭte al Zdislavo*).

Mi petas vin, sinjoro, gvidu mem tiun-ĉi kurac-
adon.

ZDISLAVO.

Mi, sinjorino?...

ANJO (*mallaŭte al Vladislavo*).

Estu tiel bona, sinjoro, kaj ne cedu de via propra kuraca metodo.

VLADISLAVO.

Sed pardonu...

(*Zdislavo kaj Vladislavo riverencas al s. Margareto kaj Anjo, kiuj eliras: la unua — tra la una pordo, la dua — tra la dua pordo maldekstre*).

SCENO DEKKVINA.

VLADISLAVO, S-ro GASPARO, ZDISLAVO.

(*S-ro Gasparo etendas ambaŭ manojn krucforme, por palpigi la pulsobaton. Zdislavo kaj Vladislavo ne rigardante lin, meditas pri la receptoj. Momento da silento. S-ro Gasparo, lacigite, mallevas ambaŭ manojn kaj rigardante ilin, videble konfuziĝas*).

S-ro GASPARO.

He? Kion do? Vi silentas, eble mia stato estas danĝera?? Nu, parolu, sinjoroj.

ZDISLAVO (*kvazaŭ vekita el sonĝo*).

Ne, kontraŭe... Vi estas sana.

S-ro GASPARO.

Kion vi diras? mi estas sana?

ZDISLAVO.

Ne, ne tute. (*Ambaŭ palpas lian pulson*).

VLADISLAVO.

Hm, hm...

ZDISLAVO (*laŭ alia tono*).

Hm!...

S-ro GASPARO (*maltrankvila*).

Kion vi rimarkas, sinjoroj?

ZDISLAVO.

Mi, se vi permesos, sinjoro, mi skribos la recepton (*iras al la skribtablo kaj sidiĝas antaŭ ĝi — al si*). La diablo mem ĝin deĉifros, ĉiokaze mi gajnos iom da tempo (*li skribas*).

VLADISLAVO.

Mi preparos al vi la medikamenton (*al si*).
La globetojn mi elŝutos teren, kaj donos al li nur
puran akvon.

S-ro GASPARO (*al si*).

Strange estas, kiel mi ŝvitas!

VLADISLAVO (*prenante boteleton el la apoteketo
kaj rigardante ĝin — al si*).

Aconit... tio estas rimedo por ŝvito... ĝi ne povas
ja malutili (*elŝutas ĉiujn globetojn en la glason
kaj prenas duan boteleton*). Chamomilla, kamomilo...
tio ne povas malutili (*ŝutas en la glason*). Rheum,
tio ŝajnas esti rabarbo... tre efika (*ŝutas en la glas-
on*). Nux... nux vomica, hm... vomiga? Nenio malbona
okazus, se ĝi eĉ estus vomiga! (*ŝutas en la glason
kaj alverŝas akvon*). Se li eluzis tiujn receptojn,
mi povas tute sendaĝere lin trinkigi tion-ĉi. (*Laiŭte,
transdonante la glason al s-ro Gasparo*). For-
glutu ĝin, sinjoro!

S-ro GASPARO (*kiu estis rigardanta jen la unu-
an, jen la duan, forviŝante la ŝviton el la frunto*).

Sed permesu... sinjoro konsilano... kiel do... tiel
senpere... sen interkonsulto... Sinjoroj, vi agas
iom rapide... tiel rapideme... subite, tiu-ĉi skribas
recepton, kaj tiu donas la medikamenton... sen inter-
konsulto, eble unu koracilo estos kontraŭa al la
alia.

ZDISLAVO (*skribante*).

Ĝi tute ne malhelpas, vi povas kuraĝe eltrinki,
kion donas la doktoro. (*Vladislavo transdonas la
glason al Gasparo — s. Gasparo forŝovas ĝin per
mano*).

S-ro GASPARO.

Sed mi tre dezirus, ke vi eĉ iomete interkonsultu...
estante jam tie-ĉi... nenio malhelpas...

ZDISLAVO.

Ne ekzistas bezono.

VLADISLAVO (*starigas la glason sur la tablo.
kaj kovras ĝin per kalendaro*).

Efektive, ekzistas nenia bezono...

S-ro GASPARO.

Sed mi vin petas, sinjoroj, tre insiste... eble tio
vin malhelpus, se mi aŭskultus, dum vi interkonsiliĝos,
sed mi estas iomete surda; cetere, parolu latine...
mi nenion komprenas — mian vorton de honoro —
apenaŭ tie kaj ie unu vorteton el la lernejo mi me-
moras; sed, diveni la sencon de la frazo, tion mi
laŭvere, pro Dio, ne povas, sekve mi petas vin, si-
noroj, interkonsiliĝu latine... kvazaŭ mi tute forestus,
kvazaŭ mi tute ne ĉeestus.

ZDISLAVO.

Eble, sinjoro kolego, vi volas, kiel unua esprimi
vian opinion (*al si*). Mi konsentos je ĉio.

VLADISLAVO.

Kontraŭe, mi cedas al vi, kolego, la unuan vorton.

ZDISLAVO.

Mi petas vin, sinjoro kolego.

VLADISLAVO.

Mi vin tre petas, komencu.

(*Ambaŭ silentas*).

VLADISLAVO.

Kion do?

ZDISLAVO.

Mi atendas?

VLADISLAVO (*sufiĉe energie*).

Mi vin ja petis...

ZDISLAVO (*plilalŭtigante la voĉon*).

Kaj mi vin, sinjoro...

S-ro GASPARO.

Nun, ili komencos interbatiĝi! Sed kompatu, sinjor-
oj, min malfeliĉan homon, ne faru ceremoniojn..

komencu iu (*malleante la kapon, konsternite*)
latine...

ZDISLAVO (*al si*).

Nun mi falis en la kaptilon (*laŭte*). Hm!

VLADISLAVO.

Ego... (*al si*). Mi ĵuras, pro Dio, ke mi ĉion for-
gesis.

S-ro GASPARO.

Nu, parolu do, sinjoroj, parolu do fine!

ZDISLAVO.

Ha, kion fari? mi saltu kuraĝe en la malvarman
akvon (*laŭte kun kelka ŝanceliĝado*). Ego... credo.
censeoque febram stomachialem... abdominalem in-
termittentem esse (*rigardas sekrete Vladislavon,*
explorante, kian li faras impreson).

S-ro GASPARO (*al si*).

Fe... fe... febram stomachialem... abdominalem...
intermittentem.

VLADISLAVO (*al si*).

Kia stranga latinaĵo? Ĉu li mokas min? Ni ek-
vidos! (*laŭte*). Mihi videtur organicas functiones ner-
vorum atacatas fuere.

S-ro GASPARO (*konsternite, al si*).

Acacatacas!

ZDISLAVO (*al si*).

Fuere? — ĉu li min divenis, aŭ ĉu li mokas? Atendu
nur! (*laŭte*). Ego credo moribundum...

S-ro GASPARO (*leviĝante rapide*).

Kion? Moribundum?... mi... mi moribundus!

ZDISLAVO (*tre konfuzite*).

Nu, ne... ne... mi volis diri moribundum... mal-
sana... malsananta... kvazaŭ paciento... kuracato... tio
estas vi, sinjoro...

S-ro GASPARO.

Ho, jes, ufl! (*ŝanceliĝas, sidiĝas kaj forviŝas la*
ŝviton).

VLADISLAVO (*al si*).

Ho, ho, moribundum, moribundum, li mokas evi-
dente.

ZDISLAVO (*al si*).

Mi konfuziĝas... nenio helpas, oni devas elekti el
iu-ĉi malsaĝa situacio. (*laŭte*) Se la estimata paciento
permesos, mi volus momenteton interkonsulti kun
la kolego sen lia ĉeesto.

VLADISLAVO (*al si*).

Li penetris min, jen kia ruzulo! Ne ekzistas alia
helpo, mi devas kapitulaci! (*laŭte*) Mi volis peti ĝuste
pri la samo.

S-ro GASPARO (*ree maltrankviligita*).

Ĉu eble... eble... mi estas danĝe... danĝe...
danĝere malsana?

ZDISLAVO.

Ho, tute ne!

VLADISLAVO.

Estu tute trankvila.

S-ro GASPARO.

Ĉu nur tute certe?

ZDISLAVO.

Mi garantias al vi.

VLADISLAVO.

Se garantias la doktoro...

S-ro GASPARO.

Mi kredas al vi, sinjoroj, mi kredas, nur ne lasu
min longe sola, ĉar tio estas iom malagraba. (*al si,*
leviĝante) Strange, kiel mi malfortiĝis.

ZDISLAVO.

Trankviliĝu, sinjoro, trankviliĝu...

VLADISLAVO (*al si*).

Se la alia garantias, (*laŭte*) ĉio estas bona. (*Ambaŭ forkondukas lin al la pordo dekstre*).

S-ro GASPARO.

Nur ne longe, ĉu ne vere... eng... eng... (*eliras en sian ĉambron*).

VLADISLAVO.

Post momento ni vin alvokos.

SCENO DEKSESA.

VLADISLAVO, ZDISLAVO.

(*Zdislavo kaj Vladislavo revenas antaŭen de l' scenejo kaj parolas*)

KUNE.

Sinjoro doktoro, kvankam ĝi estas malfacila afero, mi devas konfesi al vi, ke mi ne estas dok... (*haltas ambaŭ tre mirigite*).

ZDISLAVO.

Kion?

VLADISLAVO.

Vi, sinjoro...

ZDISLAVO.

Ne...

VLADISLAVO.

Mi...

ZDISLAVO.

Tamen... (*ambaŭ ekridegas*).

ZDISLAVO (*ĉesas subite ridi, al si*).

Eble li estas tie-ĉi pro Anjo.

VLADISLAVO (*ridante plue*).

Jen grandiozel!

ZDISLAVO.

Pardonu, ke en tiu-ĉi stranga situacio mi vin demandas, kial vi ŝajnis esti doktoro?

VLADISLAVO.

Mi povus al vi respondi per simila demando, sed ne havante motivon, por kaŝi min plue, mi diros al vi, ke mi estas nevo de sinjoro Gasparo Bolbecki. Mi venis tien-ĉi, por repacigi lin kun mia patro, ĉar ili kolere disiĝis kaj ne revidis sin de ok jaroj. Trovinte lin malsana, mi timis, ke prezentante min ne atendite, mi povus kaŭzi malutilan kortuŝon; dume la servanto anoncis min kiel doktoron kaj tiele mi fariĝis doktoro sen ekzameno kaj sen diplomo. Mi estas Vladislavo Ŝocki. Nun mi atendas vian egale sinceran konfeson.

ZDISLAVO.

Kaj mi konfidos al vi kun la sama sincereco: Mi estas Zdislavo Mojicki, inĝeniero ĉe la Pŝemislo-Lupkova fervojo. Dum la pasinta jaro mi interkonigiĝis kun fraŭlino Anno.

VLADISLAVO.

Ha, jes — pli mi ne bezonas; por la ceteraj garantias al mi la malkaŝemo, kiu vidiĝas en viaj vortoj kaj en via vizaĝo. — Sekve fidu al mi, kion mi povos helpi al vi, mi helpos.

ZDISLAVO (*donas al li la manon*).

Mi kore dankas, sinjoro.

VLADISLAVO.

Kaj kion ni faros nun kun la paciento?

ZDISLAVO.

Vi estas ja ion preparinta.

VLADISLAVO.

Kaj vi skribinta.

ZDISLAVO.

Mi faris kelke da hieroglifoj.

VLADISLAVO.

Kaj mi kunmiksitis tie-ĉi akoniton, kamomilon, rabarbon kaj nukson vomigan; ŝajnas al mi, ke tiuj kuracivoj estas tiel sendanĝeraj!

ZDISLAVO.

Hm... ŝajnus tiel... tamen...

VLADISLAVO.

Ni faros plibone, ne aplikante ilin.

ZDISLAVO.

Mi informos vin, sinjoro. Oni diris al mi en la najbaraĵo, ke la tuta malsano de sinjoro Bolbecki konsistas el tio, ke li estas multemanĝema kaj krom tio maldiligenta; mi do opinias, ke se ni lin bone malsatigus kaj poste promenigus kun ni, tio estus saĝa kaj sendanĝera... kaj la kuracilojn ni lasu flanke.

VLADISLAVO.

Vi estas prava; la diabloj scias, kion enhavas tiuj globetoj. Sekve — la dieton.

ZDISLAVO.

La plej severan.

VLADISLAVO.

Kaj promenadon...

ZDISLAVO.

Grandegan.

VLADISLAVO.

Brave, bonege! Ni havas belan tagon, la promenado ne malutilos al li, kaj ĉe-tio ni havos la okazon prezenti nin al li plej bone. Vi montros al li la utilojn, kiujn alportos al li fervojo, iranta tra lia bieno, kaj mi prezentos al lia malplena stomako disertacion pri agronomio.

ZDISLAVO.

Bonege — ni lin malsatigos kaj galopigos.

SCENO DEKSEPA.

LA SAMAJ, S-ro GASPARO.

S-ro GASPARO (*en la pordo de sia ĉambro*).
Ĉu mi jam povas?

VLADISLAVO.

Ni petas, ni petas...

S-ro GASPARO (*maltrankvile ilin rigardante*).
Nu, kio do?... mia stato... danĝera?

ZDISLAVO.

Ho, tute ne, ne ekzistas danĝero eĉ plej malgranda.

S-ro GASPARO (*kontentigita*).

Efektive?

VLADISLAVO.

Tute certe.

S-ro GASPARO (*sopiras kontente*).

Ha, — kiel agrable estas aŭdi tion.

ZDISLAVO.

Tiun-ĉi fojon ni eĉ ne skribos ian recepton.

S-ro GASPARO.

Domaĝe, eble ion...

VLADISLAVO.

Ne, — ni nur postulos iom da dieto.

S-ro GASPARO (*malkontente*).

Dieton!

ZDISLAVO.

Moderan, moderan.

S-ro GASPARO (*al Zdislavo*).

Vi scias ja, sinjoro, ke mi manĝas preskaŭ nenion.

ZDISLAVO.

Mi scias, mi scias, via sinjora moŝto.

SCENO DEKOKA.
LA SAMAJ, VALĈJO.

(*Valĉjo eniras profunde - maldekstre de l' scenejo, portante sur pleto botelon da brando, kelke da kalikoj, panon tranĉitan; li stariĝas antaŭ s. Gasparo*).

S-ro GASPARO.

Nu, ĉar vi min trankviligis, sinjoroj, ke minacas nenia danĝero, tuj mi fartas pli bone. Eble ni trinkos iom da brando antaŭ la matenmanĝo?

ZDISLAVO (*dubante, rigardas Vladislavon*).

Hm, hm!

VLADISLAVO.

Hm, hm!

(*S. Gasparo prenas el la pleto botelon kun brando kaj kalikon kaj enverŝas por si. Valĉjo metas la pleton sur la tablon, dekstre, iras malantaŭen kaj alportas la tableton, kiu staras inter la pordoj, en la mezo de l' scenejo; li elprenas el la ŝranko telerojn, kalikojn, botelon da vino k. t. p. kaj pretigas rapide la tablon; poste li eliras profunde - maldekstre de l' scenejo kaj revenas tuj kun la pleto, sur kiu estas plado kun bigoso kaj rostita kapon. La pladojn li metas sur la tablon kaj alŝovas tri seĝojn*).

S-ro GASPARO (*al Zdislavo*).

En viajn manojn, sinjoro.

ZDISLAVO (*forprenante la kalikon el lia mano*).

Permesu, via sinjora moŝto, la brandon ni ne tuŝu! (*al Vladislavo, kiu prenis la botelon el la dua mano de s. Gasparo*) In manus vestras, docte collega... (*li trinkas kaj donas la kalikon al Vladislavo*).

S-ro GASPARO.

Sed doktoro Hugo, antaŭe...

VLADISLAVO (*prenante la kalikon*).

Kuracis kontraŭe (*plenigas kalikon per brando*).

Mi, estante homeopato, opinias, ke la uzado de brando estas tre malutila, jes, eĉ danĝera! (*li trinkas*).

S-ro GASPARO.

Tamen...

ZDISLAVO.

Sic facultas exemplo docet.

S-ro GASPARO (*vidante ke Valĉjo eniras kun pladoj*).

Ha, kion fari? mi kapitulacas, sed eble, sinjoroj, vi bonvolos dividi kun mi la intermanĝeton?

VLADISLAVO.

Cum gaudio et amenitate.

S-ro GASPARO.

Bonvolu sinjoroj.

(*Ili sidiĝas. S-ro Gasparo meze, Zdislavo dekstre Vladislavo maldekstre de l' tableto*).

S-ro GASPARO (*prenante bigoson sur la teleron*).

Vera bigoso de diboĉuloj, revarmigita!
(*Transdonas la teleron al Zdislavo*).

ZDISLAVO.

Mi dankas. (*manĝante*) Bonega!

VLADISLAVO (*al Gasparo, kiu plenigas la duan teleron*).

Ne penu, sinjoro.

S-ro GASPARO.

Mi tre petas. (*transdonas la teleron al Vladislavo*).

VLADISLAVO (*gustuminte*).

Bonega! (*S-ro Gasparo volas preni por si bigoson, Zdislavo kaptas lian manon*)

ZDISLAVO.

Permesu, sinjoro... (*forprenas de li la teleron*).

VLADISLAVO (*forprenante de li la kuleron*).

Bigoson ni ne povas permesi.

S-ro GASPARO.

Kiel do, bigoseton vi ne permesas?

VLADISLAVO.

Ne, sinjoro, ne! ĉu mi ne estas prava, kolego?

ZDISLAVO (*kun plena buŝo*).

Senkondiĉe.

S-ro GASPARO.

Tio estas dolora!... sed se vi malpermesas tiel senkondiĉe, mi kontentiĝos per kapono (*li volas preni peceton da kapono*).

VLADISLAVO.

Pardonu, sinjoro, la kapono estas grasa.

S-ro GASPARO.

Sekve bona!

ZDISLAVO.

Por homo sana, certe, sed vi estas malsana...

S-ro GASPARO.

Sinjoro! mi mortas pro malsato!

VLADISLAVO.

Nu, nu, nu, ni ne volas ja mortigi vin per malsato. (*al Valĉjo, kiu staris post s-ro Gasparo, rigardante avide la matenmanĝon*). Hola, hej! alportu por la sinjoro tason da buljono.

ZDISLAVO (*al Valĉjo, kiu faris kelke da paŝoj malantaŭen*).

Malforta buljono, vi komprenas, malforta!

S-ro GASPARO (*leviĝante subite kaj ĵetante la buŝtukon sur la tablon*).

Mi ne volas! (*Li iras antaŭen de l' scenejo kaj sidiĝas kolere ĉe la skribtablo. Valĉjo revenas sur sian lokon*).

VLADISLAVO (*prenante botelon kun vino*).

Hm, Bordeaux, eble vi kolego permesos kaliketon?

ZDISLAVO (*almetante la glason*).

Gratias ago Dominationi vestrae.

S-ro GASPARO (*kraĉante tra la dentoj*).

Cik!

VALĈJO (*kraĉante tiel same en kontraŭan flankon*).

Cik!

ZDISLAVO.

Ĉu mi povas proponi al vi, kolego, flugilon de kapono?

VLADISLAVO.

Mi dankas, mi preferas tibikarnon.

S-ro GASPARO.

Cik!

VALĈJO.

Cik!

ZDISLAVO.

Kolego, kiel mi rimarkas, habet in aestimatione tibikarnon.

VLADISLAVO.

Mi ĝin tre ŝatas.

S-ro GASPARO (*al si*).

Cik! — Tio estas netolerebla! — cik!

VALĈJO (*al si*).

Cik! — Kiel ili manĝegas! — cik!

ZDISLAVO.

Nu, ankoraŭ unu kalikon por finigo.

VLADISLAVO.

Omne trinum perfectum.

(*ili trinkas — S-ro Gasparo skuas kolere la skribtablon*).

ZDISLAVO (*leviĝante*).

Kaj nun al la paciento.

VLADISLAVO (*leviĝante, al s-ro Gasparo*).

Nu, kiel vi fartas, kara sinjoro, post la matenmanĝo? (*Valĉjo forigas la manĝilaron, forportas la tablon en la antaŭan lokon kaj eliras kun la plado profunde - maldekstre de l' scenejo*).

SCENO DEKNAŬA.

S-ro GASPARO, VLADISLAVO, ZDISLAVO.

ZDISLAVO.

Ĉu ne vere, pli bone ol kutime?

(*Momento da silento*).

VLADISLAVO.

Ho, nia paciento iom koleretas?

ZDISLAVO.

Tio ne malutilas; la doktoro devas esti preparita por ĉiuj malagrabloj kaj resti pacienca. (*al s-ro Gasparo*) Nu, nu, donu al mi vian manon... (*prezas perforte lian manon, s-ro Gasparo sin defendas*). Jen, la pulso estas ŝanĝita, ho! (*skandante*) Quadrupedante putrem sonitu quatit ungula campum.

VLADISLAVO.

Ĝi galopas tiel de post la nokto.

ZDISLAVO.

Nu, nu, tio estas rebonigebla. Diru, sinjoro, mem, ĉu kutime post la matenmanĝo vi ne sentas ian... pezecon?

S-ro GASPARO (*malkontente*).

Mi sentas.

VLADISLAVO.

Specon da sufokeco?

S-ro GASPARO.

Mi sentas.

ZDISLAVO.

Certan plenvitecon?

S-ro GASPARO.

Mi tre sentas.

VLADISLAVO.

Bruon en la stomako?

S-ro GASPARO.

Teruran.

ZDISLAVO.

Evidente!... Malbona digestado, neregula cirkulado de l' sango, la sango leviĝas al la kapo kaj baldaŭ, ian belan tagon...

VLADISLAVO.

Krak!

S-ro GASPARO (*rapide leviĝas, tre timigite*).

Krak!

ZDISLAVO (*svingante la manon — nubigite*).

Krak!

S-ro GASPARO.

Pro Dio, en miaj okuloj mallumiĝas!

VLADISLAVO.

Sed ni tion ne allasos.

S-ro GASPARO (*suprenŝovante la maldekstran manikon*).

Ellasu! Jes, tuj ellasu la sangon! (*al Vladislavo, prezentante al li la brakon, kaj suprenŝovinte ĝis la kubuto la manikon de l' surtuto*). Ellasu sangon, sinjoro, ellasu tuj, mi petas!

VLADISLAVO (*foriĝante*).

Sed sinjoro, mi estas homeopato.

S-ro GASPARO.

Vere! vi ne ellasas sangon (*turnante sin al Zdislavo*). Sekve, vi ellasu, sinjoro, vi estas alopato.

ZDISLAVO (*foriĝante*).

Sed sinjoro, mi estas hidropato!

S-ro GASPARO.

Kiel do, vi diris ja antaŭ nelonge, ke vi estas alopato.

ZDISLAVO.

Ĝuste dirante alopato-hidropato.

S-ro GASPAPO.

Do ellasu la sangon!

ZDISLAVO.

Oni ne bezonas, sinjoro, ne bezonas, trankviliĝu sinjoro!

S-ro GASPARO.

Jes, vi estas trankvila, sed se estos krak!

ZDISLAVO.

Ne, ne estos, ne estos, se vi nur multe moviĝos.

VLADISLAVO.

Precipe post la manĝado.

S-ro GASPARO.

Kion mi devas fari? iradi, veturi, rajdi, ĉasi, danci, aliĝi al Falkoj-gimnastikistoj? Kion, eble banon, eble duŝon? Nu, parolu do, pro Dio!

VLADISLAVO.

Ha, certe, banon...

ZDISLAVO.

Se ekzistus duŝo...

S-ro GASPARO.

Estas, sinjoro! estas! sub la akvomuelilo! — (*vokas, turnite al pordo*). Valĉjo! Eble okaze ankaŭ la sinjoroj... por esti kune en akvo?...

VLADISLAVO.

Ni dankas, ni rigardos, starante apud la bordo.

S-ro GASPARO

Valĉjo! Valĉjo!

SCENO DUDEKA.

LA SAMAJ, VALĈJO.

(*Valĉjo eniras profunde - maldekstre de l' scenejo, kun plena buŝo*).

S-ro GASPARO (*al Valĉjo*).

Rapide, littukon, mian ĉamaron (laĉveston), la ĉapelon, bastonon! Dikan viŝtukon por la banejo. (*Valĉjo eliras en la ĉambron de s-ro Gasparo*). Do vi, sinjoroj, ne volas iri en la akvon?

ZDISLAVO.

Aliafoje kun plezuro.

(*Valĉjo venas kun la ĉamaro, ĉapelo, bastono kaj littuko, transdonas la ĉamaron al s-ro Gasparo, kiu deprenas la noktosurtuton kaj surtiras la ĉamaron*).

S-ro GASPARO.

Pardonu, sinjoroj, mi tuj estos preta.

VLADISLAVO.

Ni tre petas, sencere monie.

S-ro GASPARO.

Jen mi estas preta, ni iru sub la duŝon.

ZDISLAVO kaj VLADISLAVO.

Sub la duŝon!

(*Ĉiuj tri eliras profunde - dekstre*).

SCENO DUDEK-UNUA.

VALĈJO (*sola*).

Ili foriris baniĝi! Ha, tio devas esti bona, se la doktoroj ĝin ordonis; kaj mi jam ne baniĝis dum cirkaŭ dek jaroj! Sed kion signifas homo sen doktoro! Jen, nun estas du doktoroj en la domo, kaj ne estas eble trovi momenton, por konsulti iun. (*montras la stomakon*) Kaj ĝi min tiel premas kaj mi estas tiel dormema (*post mallonga silento*). Eble

ĝi estas la bigoso aŭ la kapon-restaĵoj? La doktoro diris, ke la kapon estas tro grasa, kaj mi formangiĝis ankaŭ la buteron! Uf! Mi fartas malbone, tre malbone! (*Ekvidante la apotekon sur la tableto maldekstre kaj la glason kovritan per kalendaro*). Kion ĝi signifas? la apoteketo estas malfermita kaj la glaso kovrita; kredeble la sinjoro doktoro preparis kuracilon. Eble mi ĝin eltrinkus? Kaj se ili demandos? Tiam mi diros, ke staris glaso da akvo kaj ke mi ĝin elverŝis. Mi povas elkuraci min per unu fojo! Ni provu! (*li trinkas malrapide*). Ne malbona, tute ne havas malagrablan guston... Ho, mi jam sentas min pli bone; la homo tuj alie spiras — kaj sentas sin malpli peza. Nun, kiel oni povas ne kredi tiun... kiel ĝi estas nomata... ho... ho... jen mi forgesis... ho... homopation! Mi ne memoris tuj, ĉar mi estas dormema... terurege. Sed mi devus iom forviŝi la polvon, iom ordigi la ĉambron... Eh! mi iros dormi iom en la grenejo... Aŭ ne, mi iros baniĝi, sed ne sub la akvomuelilo, sed sub la dua kluzo; ĉar se mia sinjoro min tie ekvidus, li tuj komencus krei: „Valĉjo, venu tien-ĉi, frotu min per la viŝtuko“! (*volas eliri, profunde de l' scenejo li renkontas doktoron Reŝko — al si*). Kiu do ree venis?

SCENO DUDEK-DUA.

D-ro REŜKO, VALĈJO.

D-ro REŜKO (*malafable*).

Aŭskultu, kiel vi estas nomata, diru al via sinjoro, ke doktoro Reŝko alvenis! rapide!

VALĈJO.

Doktoro Reŝko? Ha, ha, ha!

D-ro REŜKO.

Kial vi ridas?

VALĈJO (*ridas ĉiam pli forte*)

Doktoro Reŝko! Ha, ha, ha!

D-ro REŜKO.

Ĉu vi ĉesos ridi, malsaĝulo!

VALĈJO.

Tria Reŝko! Ha, ha, ha! (*eliras profunde - dekstre*)!

D-ro REŜKO (*kurus post li*).

Kio tria? Kiu estas la tria? mi vin tuj instruos. (*Revenante de la pordo, kiun Valĉjo brue fermis post si*). Sed mi vin ankoraŭ renkontos kaj al vi tiros bone la orelojn! Kion ĝi devas signifi?

SCENO DUDEK-TRIA.

D-ro REŜKO, JOANJO.

(*Joanjo enkuras profunde - maldekstre de l' scenejo*),

JOANJO.

Valĉjo!

D-ro REŜKO (*al si*).

Ha, ŝajne ia ĉambristino. (*laŭte*) Mia fraŭlino, kiel vi estas nomata?...

JOANJO (*riverencante*).

Joanjo, preta servi al vi.

D-ro REŜKO.

Mi renkontis tie iun malkapablulon... sed tio estas flanka afero... Diru, mi petas, al via sinjoro, sinjorino, aŭ al kiu cetere vi volas, ke mi alveturis: Doktoro Reŝko.

JOANJO (*ekridegas*).

Doktoro Reŝko!

D-ro REŜKO.

Kion ĝi signifas? Kaj ŝi ankaŭ?

JOANJO (*ridegante*).

Par... ha, ha, ha, pardonu... ha, ha, ha! (*falas sur la seĝon*).

D-ro REŜKO (*malpacience*).

Mia fraŭlino, mi estas homo ĝentila, pacienca, sed pro mil diabloj...

JOANJO.

Pardonu, sinjoro, sed... (*ridante*). En la sama tago venas la tria doktoro Reŝko... ha, ha, ha!

D-ro REŜKO (*kolerega*).

Kia tria? Kiu estas la tria? Kie estas la tria?

JOANJO.

Jen vi!

D-ro REŜKO.

Kiamaniere mi?

JOANJO.

Tute nature, ĉar ni havas tie-ĉi jam du.

D-ro REŜKO.

Du?

JOANJO.

Du doktorojn Reŝkojn.

D-ro REŜKO.

Ĉu vi, fraŭlino, mokas pri mi?

JOANJO.

Ne, tute vere; ni havas du.

D-ro REŜKO.

Kio estas? Kion ĝi signifas?

JOANJO.

Mi ne scias, sed tiel estas. Se vi permesas, sinjoro, mi tuj sciigos la mastron kaj la sinjorojn doktorojn — kaj vi mem konvinkigos, sinjoro.

D-ro REŜKO.

Bone, mi atendas.

(*Joanjo elkuras en la ĉambron de s-ro Gasparo*).

SCENO DUDEK-KVARA.

D-ro REŜKO, poste S-ino MARGARETO.

D-ro REŜKO.

Ĉu mi songas, aŭ ĉu ili ĉiuj en tiu-ĉi domo freneziĝis. Ne ekzistas ja alia doktoro Reŝko krom mi en la mondo. Mi havas nek ian kuzon, nek eĉ samnomanon. Kiu povis permesi al si... kaj eĉ du!

S-ino MARGARETO (*enirante tra la unua pordo maldekstre*).

La konsulto daŭras longe, mi maltrankviliĝas (*ekvidante D-ron Reŝko*). Ah!

D-ro REŜKO (*riverencas*).

Certe sinjorino domomastrino?

S-ino MARGARETO.

Jes. Sed kun kiu mi havas la plezuron?

D-ro REŜKO.

Doktoro Reŝko.

S-ino MARGARETO.

Sinjoro, vi?... ne povas esti!

D-ro REŜKO (*al si*).

Ŝi ankaŭ. (*laŭte*) Pardonu, sinjorino, mi ne amuzas min per mistifikado; vi, sinjorino, estas jam la tria persono, kiu miras, aŭdante mian nomon.

S-ino MARGARETO.

Sed jam estas...

D-ro REŜKO.

Unu aŭ du sinjoroj, kiuj uzurpis mian nomon, sed bonvolu klarigi tiun-ĉi aferon, ĉar mi estas la efektiva doktoro Reŝko.

S-ino MARGARETO.

Ĉu nur tute certe?

D-ro REŜKO (*ofendite*).

Do vi dubas, sinjorino?

S-ino MARGARETO.

Pardonu, sinjoro, ne, mi ne dubas... sed en mia kapo ĉio turniĝas... sekve kiu estas la dua?

D-ro REŜKO.

Aŭ pli ĝuste, kiu estas la du aliaj?

SCENO DUDEK-KVINA.

LA SAMAJ, JOANJO.

JOANJO (*elirante el la ĉambro de s-ro Gasparo*).

Tie estas neniuj, sed tra la fenestro mi vidis ambaŭ sinjorojn doktorojn, starantajn sur la bordo apud la akvomuelilo. Ŝajnas, ke sub la muelilo iu baniĝas, kvazaŭ nia sinjoro.

S-ino MARGARETO.

Granda Dio!... ili banas lin post la matenmanĝo!

D-ro REŜKO (*vivece*).

Bano post matenmanĝo? Do ni iru tien, ne perdante tempon! (*Joanjo eliras profunde-maldekstre*).

S-ino MARGARETO.

Ah! ni rapidu, sinjoro doktoro!

D-ro REŜKO.

Tuj, sinjorino. Ŝajnas al mi, ke mi havas ĉe mi la helpajn instrumentojn. (*Elprenas el la poŝo ingon kun ilaro — malfermas ĝin kaj elprenas lanceton, ŝovas la lanceton sur la mano — al s-ino Margareto*) Ĉu via edzo estas plensanga?

S-ino MARGARETO.

Tre, kvankam nun li estas malfortigita.

D-ro REŜKO.

Korpulenta, grasa?

S-ino MARGARETO.

Iom.

D-ro REŜKO.

Eble oni devos ellasi sangon...

SCENO DUDEK-SESA.

LA SAMAJ, ANJO (*eniras tra la dua pordo maldekstre*).

S-ino MARGARETO.

Vi volas ellasi sangon de Gasparo post la matenmanĝo?

ANJO.

Kio estas? ĉu la paĉjo malsaniĝis? Ĉu vi, sinjoro, barbiro, subĥirurgo, ellasos la sangon?

D-ro REŜKO.

Barbiro-subĥirurgo?

S-ino MARGARETO (*al Anjo*).

Sinjoro doktoro Reŝko.

ANJO.

Sinjoro... doktoro... Reŝ..., pardonu.

S-ino MARGARETO.

Ni iru, sinjoro, ni iru!

D-ro REŜKO (*al si*).

Barbiro, subĥirurgo! (*laŭte*). Tie-ĉi mi havas ĉion, kion mi bezonas, ni iru.

S-ino MARGARETO (*irante al la vitra pordo*).

Tie-ĉi estos pli proksime. (*eliras tra la vitra pordo*).

D-ro REŜKO (*irante post ŝi*).

Mi sekvas vin (*al ŝi*). Subĥirurgo! (*eliras post s-ro Margareto*).

ANJO (*irante post ili*).

Strangaj aferoj okazas tie-ĉi! kia estos la fino?
(*eliras post ili*).

SCENO DUDEK-SEPA.

S-ro GASPARO, ZDISLAVO, VLADISLAVO.

(*Tuj post ilia eliro aŭdiĝas post la scenejo, profunde-dekstre, la voĉo de s-ro Gasparo. Dum la tuta sekvanta sceno s-ro Gasparo iradas, farante grandajn paŝojn, sur la scenejo — Zdislavo kaj Vladislavo iras laŭpaŝe post li*).

S-ro GASPARO (*post la scenejo*).

Valĉjo, donu manĝi... (*aperas en la pordo, tremante pro malvarmo, kun ruĝa nazo; la haroj malsekigitaj, plate algluitaj al frunto kaj vizaĝo*).
Donu al mi ion por manĝi! Valĉjo... brrr... (*eniras grandapaŝe, post li Zdislavo kaj Vladislavo*).

ZDISLAVO.

Sed konsideru, sinjoro...

S-ro GASPARO.

Lasu min, mi ribelas! Valĉjo, brandon!

VLADISLAVO.

Tio povas malutili al vi, sinjoro!

S-ro GASPARO.

Tute egale... brrr... jen ia ĉeval-kuracado!...

VLADISLAVO.

Almenaŭ prenu ion facile digesteblan.

ZDISLAVO.

Ekzemple delikatan griajon.

S-ro GASPARO.

La diabloj vin forkaptu kune kun via griajo! Valĉjo!
Hola, hej! Kiu estas?

ZDISLAVO.

Sinjoro, ne tiel malkviete! tio povas malutili al vi!

S-ro GASPARO.

Mi diras al vi, ke estas por mi tute indiferente, se poste io krakos, frakasos vin, frakasos tutan vian fakultaton, mi devas manĝi nepre! Kie estas tiu azeno Valĉjo? Mi forŝiros de li la orelojn! Margarenjo! Anjo!

VLADISLAVO.

Sed, sinjoro Bolbecki!

ZDISLAVO.

Kompatu....

S-ro GASPARO (*kun kreskanta kolero*).

Mi ne kompatos, lasu min, lasu min! Hola, hej!
Margarenjo! Ĉu vi ĉiuj formortis en tiu-ĉi domo?

VLADISLAVO.

Sinjoro...

S-ro GASPARO.

Neniu estas? Neniu? Mi scias, kion mi faros: mi iros en la kuirejon, disrompos la kuirejon, disrompos la provizejon, la bakejon, la tutan domon mi disrompos kaj disfrakasos!

(*liberiĝas perforte kaj elkuras profunde - maldokstre*).

SCENO DUDEK-OKA.

ZDISLAVO, VLADISLAVO.

(Rigardas sin konfuzite. Momento da silentado).

VLADISLAVO.

Kaj nun?

ZDISLAVO.

Ĉu mi scias.

VLADISLAVO.

Malbona afero, kolego!

ZDISLAVO.

Malbona.

VLADISLAVO.

Li manĝos tro multe.

ZDISLAVO.

Tute sendube.

VLADISLAVO.

Kaj efektive malsaniĝos.

ZDISLAVO.

Kaj ni estos kulpaj.

VLADISLAVO.

Ni devas nepre ion fari.

ZDISLAVO.

Ellasi al li sangon?

VLADISLAVO.

Vi scias fari tion?

ZDISLAVO.

Mi, ne — eble vi?

VLADISLAVO.

En Altenburgo mi ellasis foje sangon al bovido.

ZDISLAVO.

Brave! Sekve ellasu!

VLADISLAVO.

Sed la bovido mortaĉis!

ZDISLAVO.

Pro diablo!

VLADISLAVO.

Ne, tio estas tro heroa rimedo.

ZDISLAVO.

Eble infuzi kamomilon?

VLADISLAVO.

Vi estas prava, kamomilon, bonega ideo!

ZDISLAVO.

Eble homeopatian?

VLADISLAVO.

Mi opinias, kutiman.

ZDISLAVO.

Mi aŭdis, ke ekzistas ia kamomilo roma.

VLADISLAVO.

Ekzistas, sed ni ĝin tie-ĉi ne havas.

ZDISLAVO.

Oni devas turni sin al la mastrino. *(irante al la pordo, profunde de l' scenejo).*

SCENO DUDEK-NAUA.

LA SAMAJ, D-ro REŜKO, S-ino MARGARETO,
ANJO.

(D-ro Reŝko eniras tra la pordo, profunde - dek-

stre de l' scenejo, — post li s-ino Margareto kaj Anjo).

ZDISLAVO kaj VLADISLAVO.

Reŝko!

D-ro REŜKO.

Vi estas tie-ĉi, sinjoridoj, kie estas la paciento?

S-ino MARGARETO.

Kie estas mia edzo, kie estas Gasparĉjo?

VLADISLAVO.

La onklo estas en la kuirejo.

S-ino MARGARETO.

En la kuirejo! Joanjo! Valĉjo, kamomilon! pretigu la kamomilon!

D-ro REŜKO.

Do li ne matenmanĝis antaŭ la bano?

ZDISLAVO.

Ne.

S-ino MARGARETO.

Joanjo!

D-ro REŜKO (*haltigante ŝin*).

Lasu ĝin, sinjorino, tio ne estas bezona.

S-ino MARGARETO.

Kion vi diras, sinjoro?

D-ro REŜKO.

Mi diras, ke ni ne bezonas la kamomilon, sinjorino, trankviliĝu pri via edzo.

ZDISLAVO (*proksimiĝante*)

Permesu, sinjorino, ke mi uzu tiun-ĉi momenton por peti pardonon.

S-ino MARGARETO.

Bone, bone (*al Reŝko*). Sed kiel li povas resti sen kamomilo, eble menton...

D-ro REŜKO.

Ne, sinjorino, li ne bezonas.

VLADISLAVO (*al Reŝko*).

Kiel bone estas, ke vi alveturis, vi nin malimplik-
os el tiu-ĉi situacio.

D-ro REŜKO (*ironie*).

Mi malimplikos? vi tiel opinias?

ZDISLAVO (*kiu mallaŭte parolis kun Anjo*).

Kompreneble.

D-ro REŜKO.

Facilanimuloj, petoluloj!

VLADISLAVO.

Ho, ho! Ni kuracas lian pacienton, kaj li ankoraŭ
nsultas nin pro tio.

D-ro REŜKO.

Certe, mi devus esti dankema al la sinjoroj ku-
racistoj.

ZDISLAVO.

Ni faras al vi bonan reputacion.

D-ro REŜKO.

Ho, ne! por tio mi dankas ĝentile! Ne, miaj kar-
uloj; la bieron, kiun vi kuiris, nun eltrinku mem, —
mi forveturas.

ZDISLAVO.

Sed, amata doktoro...

VLADISLAVO.

Ora doktoro...

D-ro REŜKO.

Ora, amata, nenion helpos.

S-ino MARGARETO (*rigardante la tableton maldekstre*).

Dio mia! jen ili preparis tie-ĉi ion el la homeopatia apoteketo!

D-ro REŜKO.

Se nur el la homeopatia, ĝi estas nenio danĝera.

VLADISLAVO.

Jes, onklinjo, nenio danĝera; mi kunmiksas nur iom da akonito, kamomilo, rabarbaro...

S-ino MARGARETO.

Granda Dio! kion vi faris!

D-ro REŜKO.

Trankviliĝu, sinjorino, mi garantias, ke tio ne malutilos al li.

ZDISLAVO.

Vi estas certa?

D-ro REŜKO.

Tute certa. Kaj nun mi ĉiujn adiaŭdiras kaj forveturas.

VLADISLAVO.

Vi forveturas?

ZDISLAVO.

Ne faru stultajon!

D-ro REŜKO.

Ĉu mi faris tie-ĉi ion malsaĝan?

ANJO (*proksimiĝante al li*).

Sinjoro doktoro!

D-ro REŜKO.

Kion vi ordonas, sinjorino?

ANJO (*malleante la okulojn*).

Mi volus... mi opinias...

S-ino MARGARETO.

Niaj sinjoroj kuracistoj estas jam sufiĉe turmentitaj, ni do petas vin, sinjoro, ke vi restu.

D-ro REŜKO (*rigardante Anjon kaj Zdislavon*).

Ha, jes, vere, koncerne tion, kion vi, sinjorinoj, konfesis al mi, kiam ni iris kune al la akvo-muelilo. Nu, nu, mi klopodos por aranĝi tion iamaniere.

ZDISLAVO (*premante lin al si*).

Amata doktorĉjo!

VLADISLAVO (*prenante lian manon*).

Bona, honesta doktoreto.

S-ro GASPARO (*post la pordo profunde-maldekstre per malforta voĉo*).

Valĉjo! Valĉjo!

SCENO TRIDEKA.

LA SAMAJ, S-ro GASPARO, VALĈJO.

S-ro GASPARO.

(*Eniras tra la pordo profunde-maldekstre; Valĉjo profunde-dekstre; S-ro Gasparo iras malrapide, ŝovante la piedojn, parolas per malforta voĉo. Valĉjo estas pala, la nazo — ruĝa, haroj malsekaj, falantaj sur la okulojn; premas sian stomakon*).

Valĉjo!... Margarenjo! oj!

VALĈJO.

Oj! oj!

S-ro GASPARO.

Anjo!... Ĉu iu estas tie-ĉi?

S-ino MARGARETO.

(*iras al li kaj subapogas lian dekstran brakon*).

Gasparĉjo, kio mankas al vi?

VALĈJO.

Oj!

S-ro GASPARO (*montrante la stomakon*).

Tie-ĉi... tie-ĉi... porkido el rostilo...

(Anjo kune kun Zdislavo ŝovas la seĝon sur la mezon de P scenejo. S-ro Gasparo kaj Valĉjo alproksimiĝas samtempe al la seĝo. S-ro Gasparo maldekstre, Valĉjo dekstre, Zdislavo kaj Vladislavo iras iom malantaŭen-dekstre. Doktoro Reŝko stariĝas post ili).

S-ro GASPARO.

KUNE { Savu!
VALĈJO.
Mi mortas!

(Ili falas samtempe sur la seĝojn. S-ro Gasparo leviĝas subite, kaptas Valĉjon je P nuko kaj forte lin forpuŝas).

S-ro GASPARO (*per forta voĉo*).

Ĉu vi foriĝos, sentaŭgulo!

VALĈJO (*per agonia voĉo*).

Eĉ morti li al mi ne permesas!

S-ro GASPARO (*sidiĝante sur seĝon, per malforta voĉo, montrante la stomakon*).

Tie-ĉi... tie-ĉi... kie estas la doktoroj?...

VALĈJO (*forirante malantaŭen, kie li falas sur la seĝon*).

Kaj mi estas tiel ŝuferanta!

S-ino MARGARETO (*maltrankvile*).

Sinjoro Reŝko!

(D-ro Reŝko faras al ŝi signon per mano, ke ŝi estu trankvila).

S-ro GASPARO.

Ho, ve, mi sentas min malbone, tre malbone, rapide... kie estas la doktoroj? (*ekvidante Zdislavon kaj Vladislavon*) Ah, miaj sinjoroj!.. Mi malobeis... mi formanĝis porkidon!.. pardonu... savu!.. la sango leviĝas al la kapo (*al Zdislavo, etendante al li sian*

maldekstran manon). Pulson! palpu mian pulson. (Zdislavo iras post la seĝon, maldekstre, kaj de tiu-ĉi momento li interparolas kun Margareto, kies manon kisas Anjo). Vi koleras kontraŭ mi, sinjoro? (*per pli forta voĉo malpacience*). Sed mi jam petis pardonon, kaj petas nun refoje. Oj! (*per malpli forta voĉo al Vladislavo, donante al li la manon*). Eble vi, sinjoro homeopato... kampu, ĉiu minuto estas kara... Sinjoro, sinjoro, kion faras la pulso-bato? (*Vladislavo iras maldekstren al Zdislavo, s-ro Gasparo turnas sin al ili*). Kion vi ordonas? Vi estas senkomataj!

D-ro REŜKO (*alpaŝante kaj palpante la pulson de lia maldekstra mano, kiun li tenis meĥanike-eten-dite*).

La pulso estas trankvila.

S-ro GASPARO (*turnante sin al li mirigite*).

Kaj... vi, sinjoro, kiu vi estas?

D-ro REŜKO.

Doktoro Reŝko.

S-ro GASPARO (*leviĝante subite kolere*).

Ne, mia sinjoro, tio estas jam tro multe! Mi povas esti malsana, mi povas esti mortanta, sed mi ne permesos, ke oni moku pri mi, kaj mi ĝin ne toleros. (*iradas grandapaŝe fronte de P scenejo*).

D-ro REŜKO.

Ne koleru, sinjoro; — mi estas doktoro Reŝko el Tarnov, — nun loĝanta en Pŝemisl.

S-ro GASPARO.

Fil pro ĉiuj diabloj! Ĉu en mia domo rompiĝis rivera transportŝipo, plena de Reŝkoj?

D-ro REŜKO.

Ne, via sinjora Moŝto — mi estas la sola, vera doktoro Reŝko.

S-ro GASPARO.

Do la aliaj?

D-ro REŜKO.

Falsaj Reŝkoj.

VALĈJO (*leviĝante subite*)

Banditoj!

(*s-ro Gasparo transsaltas dekstren antaŭ Reŝkon*).

D-ro REŜKO (*al Valĉjo*).

Stultulo! (*al s-ro Gasparo*) Ne, sinjoro, — tiu-ĉi homeopato (*montrante Vladislavon*) ne estas homeopato, sed senkulpa agronomo... via nevo, Vladislavo Ŝocki.

S-ro GASPARO.

Ŝocki, filo de mia bofrato?

VLADISLAVO.

Amata onklo...

S-ro GASPARO (*rapide*).

For, for el mia domo, foriĝu, tuj foriĝul..

S-ino MARGARETO.

Sed, Gasparĉjo, mia frato lin sendis tien-ĉi, por ke li petu vin pri pardono.

S-ro GASPARO (*pli kviete*).

Ke li petu min pri pardono... jes, tio estas alia afero...

VLADISLAVO.

Mia patro deziras repaciĝi kun la onklo.

S-ro GASPARO.

Peti pardonon... repaciĝi... nu, se vi tiel parolas, bone... mi pardonas kaj repaciĝas; venu tien-ĉi, bubo, ke mi vin premu al la koro.
(*Vladislavo ĵetas sin al li en la brakojn, s-ro Gasparo alpremas lin*).

S-ino MARGARETO.

Ni danku al Dio!

S-ro GASPARO (*ĉirkaŭpreninte Vladislavon, rigardas poste suspekteme Zdislavon*).

Kaj la dua... kiu li estas?

ZDISLAVO (*konfuzite*)

Mi, sinjoro, estas... Zdislavo Mojicki! unuaklasa

inĝeniero ĉe la Pŝemislo-Łupkova fervojo, mi alvenis tien-ĉi, havante la celon, la intencon...

S-ino MARGARETO.

Sinjoro Mojicki petas nin, ke ni permesu al li svati sin pri Anjo.

S-ro GASPARO.

Ho, ne, tio estas vana... mi jam unu fojon diris, ke mi fordonos mian filinon nur al doktoro... mi volas, ke mia bofilo estu kuracisto.

D-ro REŜKO.

Ĉu la vivo jam tiel abomeniĝis al vi, sinjoro?

S-ro GASPARO.

Kial? pro kio?

D-ro REŜKO.

Vi ne komprenas?... Bopatro kaj bofilo... bofilo kaj bopatro... unu el ili estas kuracisto!

S-ro GASPARO.

Mi ne komprenas.

D-ro REŜKO.

Ĉar li, antaŭ ol pasos ses monatoj, forekspedos vin, ne aplikante eĉ venenon.

S-ro GASPARO (*frapante sian frunton*).

Ho! nun mi komprenas! (*vivece al Zdislavo*). Sinjoro! sinjoro, kiel do vi estas nomata?..

ZDISLAVO (*riverencante*).

Zdislavo Mojicki.

S-ro GASPARO

Tio estas por mi indiferenta. Vi certe ne estas kuracisto?

ZDISLAVO.

Ne, sinjoro, mi estas...

S-ro GASPARO.

Respondu tute rekte, sen elturniĝoj... vi donas vian vorton de honoro, ke vi ne estas kuracisto?

ZDISLAVO.

Mian vorton.

S-ro GASPARO.

Bone!... Vi havas mian filinon.

ZDISLAVO.

Ah, sinjoro! kiel mi estas dankema...

S-ro GASPARO.

Anjo, vi konsentas?

ANJO (*vivece*).

Mi konsentas, paĉjo, mi konsentas!

S-ro GASPARO.

Ho, ho! Jen rigardu, kiel volonte!... Sed klarigu al mi nun, kial ili... (*montrante Zdislavon kaj Vladislavon*).

D-ro REŜKO.

Komencis vin kuraci? — Por konvinki vin, sinjoro, ke vi estas tute sana, kion plej bone pravas tio, ke post malsatigo kaj bano, por kiuj vi ŝuldas dankon al tiuj-ĉi sinjoroj kuracistoj, vi formanĝis porkidon kaj fartas bone.

S-ro GASPARO.

Jes, jes, tute vere, mi formanĝis porkidon kaj fartas bone...

VALĈJO (*proksimiĝante al doktoro Reŝko*).

Sed mi estas tre ŝuferanta... mi... mi eltrinkis el tiu-ĉi glaso la homeopation.

D-ro REŜKO.

Ho, tio estas tre danĝera.

VALĈJO.

Danĝera! mi mortas! (*li ŝanceliĝas*).

D-ro REŜKO.

Jes, iam vi mortos sendube!

S-ro GASPARO.

Kaj nun ni iru tagmanĝeti, ĉar mi rericervis la veran apetiton, dank' al tiu prosperinta Consilium facultatis.

FINO.